

Flāndra **ESPERANTISTO**

TIJDSCHRIFT VOOR ESPERANTO - ONDERWIJS EN -PROPAGANDA

Vershijnt maandelijks
Zeventiende jaargang
Nummer 11 (197)
NOVEMBER 1950

Vertegenwoordiger in Nederland :
L E E N
sekr. Stadionkade 6, Amsterdam Z.
postrek. 34563 van P.M. Mabesoone
Pythagorasstr. 122 Amsterdam O.

Orgaan van de
VLAAMSE ESPERANTISTEN-BOND
POSTBUS 342, BRUSSEL
Postrekening 2321.50 van V. E. B.

LIDGELDEN :
* Leden : 75 fr.
* Steunleden : min. 150 fr.
Inwonende leden : 25 fr.
(* met bondsorgaan)

ABONNEMENTEN :
België : 60 fr.
Ceteraj landoj : 75 bfr.
Proefn. : 5 fr. (1 r.k.)

Porinstruista kurso en Popol-altlernejo "Overcinge" (NED.)



Tre miksitaj grupo de 39 geprofesoroj kaj geinstruistoj atendis lundon, la 19-an de julio, la komencigon de porkomencanta kurso de s-ro Andreo Ĉe, organizita de la Popolaltlernejo «Overcinge» kaj la Oficejo «Esperanto ĉe la Instruado». Inter la gepartoprenantoj, kies plimulto estis ina, estis danino, svedino kaj franco el Anglujo. La dua agrable surprizis la kursanaron dimanĉmatene per belega nacia kostumo. Ankaŭ laŭ religio la kunkularo estis tre varia : katolikoj, protestantoj, nereligiaj kaj humanistoj. Malgraŭ tio baldaŭ formiĝis gaje babilanta, ridanta kaj kantanta rondo, kies anoj sentis sin unu familio, dank' al la daŭra zorgado de la stabo de la Altlernejo.

Flanke de la Esperanto-kurso ĉi tiu prizorgis belajn kaj interesajn ekskursojn kaj prelegojn, eĉ tiom, ke speciale la unuan semajnon la gepartoprenantoj iom plendis pro tro malmulta tempo por korespondado kaj studado.

Pri la kurso mem mi aŭdis nur laŭdon. La bonhumoreco de la gvidanto, s-ro Ĉe, kaŭzis oftajn ridospasmojn. Ne mirige estas, ke per tiel gajaj lecionoj li tuj

kaptis siajn gelernantojn, kiujn li kvazaŭ senpene transsorĉis en novbakitajn entuziasmojn.

En unu el la unuaj vesperoj la subskribinto rakontis pri Esperanto kaj nia movado ; la lastan vesperon s-ro Isbrücker faris eksterprograman, tre satatan paroladon pri mondfederalismo kaj mondlingvo.

Cetere la kurso finiĝis per tre amuza varia vespero, en kiu kelkaj gepartoprenintoj sprite montris siajn progresojn kaj dankis la altlernejon kaj la oficejon pro la organizado de la kurso, s-ron Ĉe pro la bonegaj kaj belegaj lecionoj, kies pedagogian valoron ĉiuj taksis tre alta.

Sabatmatene, la 27an ĉiuj iris hejmen kiel propagandantoj de nia facila, bela lingvo.

Popolaltlernejo kaj Oficejo rajtas paroli pri plensukcesa aranĝo, kiu, se eble, ripetigu la sekvontan jaron.

P. W. Baas.

1950-1951 !

Fakte jam komenciĝis nova jaro por ni, post la kongresoj, post la feria periodo.

Ĉu tiam ne estas oportune foje esplori la pasintan kaj la estontan jarojn ? Ĉar ĉiuj entreprenoj, ĉiuj asocioj, eĉ bone laborantaj sekcioj, ankaŭ sur la Esperanto-kampo, faras tion.

Ni nepre devas rerigardi al nia pasinta agado, registri la akiritajn rezultatojn, resumi la konstatitajn mankojn kaj konkludi.

Poste ni planu, buĝetu la periodon 1950-1951 por ke tiuj mankoj fariĝu sukcesoj kaj ke definitive forestu la vanaj klopodoj, la senutilaj, eĉ malutilaj kaj hezitaj paŝoj.

Tio estu via tasko, karaj gelegantoj, sed ni kuraĝas tiri vian atenton al la problemo ; vi komprenos tion : ni konas nin mem kaj ni bezonas, de tempo al tempo, ke oni memorigu nin pri nia devo !

Ne estu tro mildaj al vi mem, ĉar ni kutime tro dorlatas nin ; tamen ne troigu en la kontraŭa senco : provu esti sincera kaj uzi la ĝustan mezurilon !

Kaj ne pensu : nu, kiom gravas mia personeto, estas ja la asocio, la sekcio kaj iliaj gvidantoj, kiuj plenumos la laboron. Erare, geamikoj, erare !

Tiel rezonante vi forgesas ion gravegan : la tuto konsistas el eroj, kaj sen la bona funkciado de la eroj, tuto ne prosperas.

Kaj jen, la ero estas vi kaj, kiel ajn vi baraktos kaj fuĝos vian respondecon, restos la neeskapebla konstato : « La ero estas mi ! »

Tial, kara membro, plenumu nian peton. Ni ne postulas publikajn esploron kaj konfeson. Faru tion por vi mem, antaŭ vi mem... kaj konkludu !

Kaj ne forgesu ke de via teniĝo dependas la kresko, la plu-ekzistado de via asocio kaj ĝia kontribuo

« DE ESPERANTIST » POR INSTRUISTOJ

En la oktobra numero de «Nederlanda Esperantisto» ni povis komuniki la ĝojigan sciigon ke en la ministrejo por instruado, artoj kaj sciencoj oni preparas modifon en la leĝo pri la elementa instruado, kiu oficiale ebligas nedevigan instruon de Esperanto en unuagrada lernejoj. Sed — la nombro da instruistoj-esperantistoj neniel sufiĉos por esperantigi ĉiujn gelernantojn en tiuj elementaj lernejoj, kiuj, profitante la novan oficialan leĝan permeson, deziras enkonduki Esperanton kiel nedevigan fakon ! La oficejo «Esperanto ĉe la Instruado», komprenante tion, aranĝis ĉi-somere specialan kurson por geinstruistoj en popolaltlernejo «Overcinge» apud Havelte, sed tiamaniere atingis nur malgrandan nombron da instruistoj. Nur enkonduko de Esperanto kiel deviga fakto en la seminariojn povos solvi la malfacilaĵojn kaj pro tio la Oficejo jam la 1-an de nov. 1948 turnis sin al la ministro por pledi por tiu solvo. La ministro tamen respondis, ke ne estas eble aldoni Esperanton al la devigaj fakoj de la seminarioj instruoprogramoj sed aldonis al tiu komunikilo la promeson, ke li serioze atentus la aferon ĉe la leĝprojekto pri reorganizo de la seminarioj instruado. Malgraŭ tiu promeso la ĵus aperinta leĝprojekto neniel mencias Esperanton. Pro tio la oficejo «Esperanto ĉe la Instruado» nun turnis sin al ĉiuj parlamentanoj pere de cirkulero, en kiu ĝi denove urĝe pledas por enkonduko de Esperanto kiel deviga fakto en la seminariojn. La cirkulero i.e. rememorigas pri la fakto ke jam en 1948 la peton de la Oficejo subtenis 113 komunumestaroj, «Broederschapsfederatie», la nederlanda sekcio de I.O.G.T., V.A.R.A., N.V.V., A.J.C. kaj C.P.N. ; atentigas pri la transdono de la petskribo al U.N.O. en Lake Success la 2-an de aŭgusto 1950 kaj krome mencias la favorajn opiniojn de diversaj instru-aŭtoritatoj kaj la financon kaj moralan subtenojn en aliaj landoj fare de registaroj kaj komunumestaroj. Ĉu nun trankvile atendi, ĝis kiam Esperanto estos oficiale enkondukata en la seminariojn ? Kompreneble ne ! Imitante la bonan ekzemplon de la oficejo «Esperanto ĉe la Instruado» ni ĉiel klopodu interesi la geinstruistojn pri Esperanto.

al la plivastigo de nia komuna, humana kaj necesega Idealo: Esperanto !

Dro T. Ken

Daŭra propagando en instruistaj rondoj estas urĝe necesa ! Ekzistas diversaj broŝuroj, i.a. «Richtlijnen bij het onderwijs van Esperanto op de school», kiuj estas verkitaj speciale por tiu celo, sed pli efikas propagandilo kiu «konstante frapas» kaj restas aktuala. Pri tia propagandilo ni disponas ; ĝi estas «De Esperantist», kies speciala celo estas vekti interesigon en instruistaj rondoj. Jam kelkaj sekcioj regule sendas «De Esperantist» al diversaj lernejoj, instruistaŭtoritatoj, k.t.p. sed ĉiuj sekcioj devus fari tion ! Regule ĝi ja mencias la freŝdatajn progresojn kaj aktualajn novaĵojn el nia movado kaj fakte estas nemalhavebla, ne nur por la propagando en instruistaj rondoj, sed ankaŭ por la ĝenerala propagando. Pro tio la ĉefestraro jam antaŭ kelkaj jaroj decidis regule sendi «De Esperantist» al ĉiuj sekciaj donacantoj, por ke ili tiamaniere estu informataj pri la progresoj en nia movado. Komprenante la valoron de «De Esperantist» por propagandaj celoj, pluraj sekcioj kaj aktivaj geanoj regule mendas ekstran kvanton por regula alsendo al publikaj legejoj kaj aliaj institucioj kaj por vendo okaze de propagandkunvenoj, k.t.p. Jen propagandmetodo, kiun ĉiu povus kaj devus apliki, ĉar ĝi estas malmultekosta kaj ne postulas multan tempon. Do, propagandu ĉie, sed speciale en instruistaj rondoj kaj mendu la bezonatan kvanton de «De Esperantist» ĝustatempe ĉe s-ro E. A. Burk, oostduinstraat 58, I, Amsterdam-West.

DIVERSAĴOJ

«Heroldo» festas sian 30-jaran jubileon. Ni kore gratulas la nelacigeblan redaktoron s-ron Teo Jung kaj volonte atentigas niajn anojn pri la prospekto, aldonita al ĉi tiu numero.

«Radiogids», la programrevuo de V.A.R.A., regule publikigas la Esperanto-programojn, kompilitajn kaj alsendatajn de radio-servo N.C.K.E. Bedaŭrinde la aliaj radiorevuoj ĝis nun ne faris tion. Bonvolu skribi peti enpresigon al la koncernaj redakcioj, ĉar enpresigo de la Esperanto-elsendoj regule atentigas la ne-esperantistojn pri la praktika utilo de nia internacia lingvo !

La Asocio de Laboristaj Esperantistoj F.L.E. festos en 1951 sian 40-jaran ekziston. La jubilea kongreso okazos je Pasko en Amsterdam.

PRELEGVOJAĜO TADROS MEGALLI

Nia egipta samideano Tadros Megalli, fininte siajn prelegvojaĝojn tra Svedujo kaj Danujo venis komence de septembro al Nederlando laŭ invito de la Nederlanda Centra Komitato Esperantista por en multaj lokoj prelegi pri sia hejmlando.



Cliché's „Het Parool“

Li montrigis flua parolanto, kiu rakontis multajn sciindaĵojn pri la lando de la piramidoj, ilustrante siajn prelegojn per lumbildoj kaj gramofondiskoj. En kelkaj lokoj li parolis nur por la esperantistoj ; en aliaj lokoj liaj prelegoj propagandecel estis tradukataj en la nederlandan lingvon por ne-esperantista publiko. Merkedon la 27-an de sept. li estis intervjuata de s-ro W. F. Kruit antaŭ la V.A.R.A.-mikrofono. Tiuj, kiuj ne aŭskultis la ensendon, povas legi detalan intervjun, kiun publikigis s-ro Teo Jung en «Heroldo» de 16 okt. 1950.

La Redakcio klarigas :

La lasta parto de la «Kritikaj impresoj pri la Pariza Universala Kongreso», nome Rememoro pri la dudeka, estis ensendo de nia Amiko, s-ro H. Vermuyten. Pro presista eraro la mencio de lia nomo mankis. Li sendube jam bonvole estos pardoninta nin !

DOKUMENTA SERVO

Kio okazis en 1949 ?

(Fino)

USONO

Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko (E.A.N.A.) reaperigis sian organon *Amerika Esperantisto*. Ĝi eliras dumonate 30-paĝa kaj estas unu el la plej belaspektaj naciaj Esp. gazetoj. Propagandbroŝuro eldonita de (neesp-ista) Nacia Eduka Asocio de Usono aperis je 20.000 ekz. *Esperanto, the World Interlanguage*, 250-paĝa verko, priaktanta la bezonon pri int. lingvo, ĝian historion, la Esp.-movadon kaj enhavanta krome lernolibron, legolibron kaj vortaron, aperis je dua eldono. En Usona parlamenta protokolo dufoje menciita pri Esp., en la *Encyclopedia Americana* kaj *The New International Year Book* detala artikolo pri Esp. Grava filantropa fondaĵo monsubtenis Esp.-laboron de E.A.N.A.

Finante nian kronikon ni konfesas, ke ĝi estas mankhava. Ĝi povus esti pli bona, se ni ricevus pli da informoj. Tial ni petas al ĉiuj asocioj regule sendi al ni sian organon, raportojn kaj informojn. Krome ni petas alsendon de kritikoj, rimarkoj, k.t.p.

G. P. de Bruin

Dokumenta Servo de la Nederlanda Centra Komitato Esperantista (N.C.K.E.)

Preangerstr. 35 Enschede, Nederlando.

MIS-CELINTA AMO

*Timema, senkuraĝa,
mallaŭta via rido
similas al nesaga
esprim' de stulta fido,*

*kiam vi min matene
mallaŭte eksalutas
kaj al mi timoplene
rigardojn viajn ŝutas.*

*Kaj viaj blankaj manoj
ektremas tiam vibre
sub ruĝaj hontobanoj
kvazaŭ senekvilibre :*

*Ĉar la alia viro
posedas vin kaj havas,
sed min vi kun sopiro
desiras, volas, amas...*

KAROLO PIC.

FORIGENDA BALASTO

En tre leginda raporto, verkita komisie de Germana Esperanto-Asocio de d-ro Arthur Bormann kaj kies kompleta titolo estas « Memorando pri fundamenta plisimpligo en internacia trafiko per uzado de dulingvaj dokumentoj », la aŭtoro prave kritikis la ĝenon, kiun kaŭzas la multlingveco ĉe uzado de dokumentoj en la internacia trafiko. Aŭtisto, veturanta eksterlandan fakte estas kompatinda persono, ĉar li devas kunporti tutan bibliotekon, konsistantan el 23-lingva aŭtista licenco, 23-lingva aŭtolicenco, plurilingva triptiko kaj la necesaj personaj legitimiloj. Ke tia stato estas netolerebla pruvis la praktiko per tio, ke spite la internacian konvencion kelkaj ŝtatoj faris unu kun alia apartan akordon pri pli simpla procedo. Por forigi la superfluan malŝparon de tempo, pupero kaj administracia laboro kaj la ĝenon kaŭzatan al la individuoj, la aŭtoro proponas uz' dokumentojn, kies tekstoj estas verkitaj sole en la lingvo de la eldona lando kaj kompletigitaj per traduko en Esperanton. Tio signifus, ke ĉiu nacia lingvo, ankaŭ tiu de malgranda lando, estas egalrajta en internacia trafiko kaj ke tamen la kompreniĝebla estas garantiita pere de unu universala lingvo. La 38-paĝa aŭtolicenco tiukaze ampleksus ne pli ol 4 normajn aŭ 2 duoblajn paĝojn... La samo validas por aliaj internaciaj dokumentoj, ekz. pasporto, frajtletero, dogandeklaro, triptiko kaj internacia respondkupon. Estas konate, ke postistoj ne sciante la fremdajn lingvojn, kelkfoje erare metas la stampon dekstre anstataŭ maldekstre sur la respondkuponoj kiu perdas pro tio sian valoron...

Jam pluraj registaroj, laŭ instigo de la landaj Esperanto-asocioj, decidis rekomendi la uzadon de Esperanto sur la internaciaj poŝtaj respondkuponoj. Sed multe da balasto restas ankoraŭ forigenda!

LA STUDANTO

25.000 ekzempleroj!

Uitwerking van de opgaven in het vorige nummer :

Malsana komparano komprenis, ke li havas nur mallongan tempon (liĝ. voorw.) por vivi. Li diris al siaj du filoj : « En la kampo malantaŭ la farmbieno troviĝas granda trezoro. Post mia morto vi devas serĉi ĝin (liĝ. voorw.). »

Kelkajn tagojn (bep. zonder voorzetsel) post kiam la patro mortis, la filoj komencis serĉi la trezoron (liĝ. voorw.). Ili laboregis, sed trovis nenion (liĝ. voorw.). La filoj fosis profunde en la tuta kampo (richtings-n is overbodig) kaj turnis de la tero la supron (liĝ. voorw.) malsupren (richtings-n), sed ne trovis la trezoron (liĝ. voorw.).

Kiam venis la printempo, ambaŭ fratotoj semis tritikon (liĝ. voorw.) en la kampon (richtings-n). La greno kreskis bonege. Neniam ili vidis tian belegan tritikampon (liĝ. voorw.).

Nun la filoj komprenis, kion (liĝ. voorw.) la patro volis diri:

Vertaling :

Een zieke boer begreep, dat hij nog maar korte tijd te leven had. Hij zei tegen zijn beide zoons : « In de akker achter de boerderij bevindt zich een grote schat. Na mijn dood moeten jullie die zoeken. »

Enkele dagen nadat de vader overleden was, gingen de zoons naar de schat zoeken. Zij zwoegden, maar vonden niets. De zoons groeven diep in de hele akker en keerden de aarde onderste boven (lett. : bovenste onder) maar vonden de schat niet.

Komunikoj de la Libro-Servoj LEEN kaj V.E.I.

Ĉu vi ne jam mendis la belegan libron :

REMBRANDT, LA MAGIISTO ?

Ĝi estas la tragedio de artista vivo. Belega bonstila verko, enhavanta 100 ilustraĵojn pri la majstraĵoj kaj la vivo de la famkonata pentristo ! La prezo estas nepre malalta : guld. 5.— ; b.fr. 65.— Restas nur kelkaj ekzempleroj !

Ankaŭ preskaŭ elĉerpitaj estas la argentaj Zamenhof-kuleroj !

Ankaŭ ĉiam la plej bela donaco ! La prezo estas vere ridinda ! Oni ne pagas la sendkostojn !

Ni petas vian atenton por :

INTERLINGVISTIKO kaj ESPERANTOLOGIO

de Dro W. Manders Prezo : guld. 2,25 ; b.fr. 30.—

Jus aperis

VORTOJ KAJ ESPRIMOJ POR KOMENCANTOJ

kompilitaj de C. B. Zondervan

Jam nun pensu pri la venonta LIBRO-TAGO !

Mendu ĉe :

Boekendienst LEEN, Z.O.-Singel 5, Bergen-op Zoom (giro 76915)
Vlaams Esperanto-Instituut, Blankenbergsesteenw. 72 Brugge (PCK 3268.51)

Toen de lente aanbrak, zaaiden de beide broers tarwe op de akker. Het koren schoot prachtig op. Nog nooit hadden ze zo'n prachtig tarweveld gezien.

Nu begrepen de zoons, wat de vader had bedoeld.

1. En nia lando la vetero ofte ŝanĝiĝas ; jen pluvas, jen brilas la suno.

2. Atendinte duonan horon mi foriris.

3. Se mi estus tiel malsana, mi konsultus kuraciston.

4. Kiu ajn venos, hodiaŭ mi povos akcepti (niet : ricevi) nenion.

5. Mi (ĝuste) estis elironta, kiam oni (iu) sonorigis (de vorm « estis sonorigate » is erg lelijk en bovendien minder juist).

6. Tiu knabo estas multe pli forta ol lia (nooit sia in het onderwerp zelf !) frato ; li estas preskaŭ same forta kiel lia patro.

7. La infanoj banis sin (bani is overgankelijk !) en la rivero.

8. Zorgu, ke vi leviĝu je la sesa, por ke vi ĝustatempe estu ĉe la stacidomo (atingu la stacidomon).

Vertaling van de uitdrukkingen :

Kriil ĝis raŭkeco (kriil sin raŭka) ; streĉi la orelojn ; antaŭ tagiĝo ; esti ofendigema ; tio ne estas superebla ; tio estas decidita afero ; tio superas mian komprenon ; mi jam antaŭvidis tion ; li revenis, ne atinginte sian celon ; mi humile dankas ! » ignori (malalenti) ies konsilon ; penegi (klopodegi) ; por pleniĝi la malfeliĉon ; li vizitita min ĉiun duan tagon (alterntage) ; li fordormis sian ebriecon ; insulto iun perfidulo ; ĉiu birdo kantas laŭ sia beko ; sen konsidero al la persono ; aĉeti ion kredite ; havi malbonan memorkapablon.

1. Hieraŭ ni renkontis (beter dan : estas renkontintaj) konaton de nia tajloro.

2. Li posedas mil guldenojn pli ol lia frato.

3. Ĉar vi ne studis longe, estas preskaŭ certe, ke vi ne sukcesos.

4. Lia postulo konsternis (konsterni is overg.) min, ĉar tio (mag niet wegge-laten worden !) kion li postulis, montri-

ĝis neefektivigebla.

5. Li skribis al mi leteron, en kiu li komunikiis, ke li ne abonos (tijdsvorm van de directe rede) la novan gazeton.

Vul in : ant, int, ont, at, it of ot :

1. Boj — aj hundoj ne mordas. 2. Mi estis elir — a, sed lastmomente mi estis malhelp — a. 3. La leporo falis teren, traf — e de kuglo. 4. Se mi ĝustatempe estus vek — a, mi ne estus maltraf — a la vagonaron. 5. Mi gratulis la sukces — an kandidaton. 6. La dron — o kriis por helpo ; feliĉe li ĝustatempe estis sav — a de pas — a policisto. 7. Lav — e kaj mang — e la infanoj iris al la lernejo. 8. La policano kondukis la ares — ojn al la policejo. 9. La barbiro sapumis la klienton, kiu estis raz — a. 10. Mi estus partopren — a la ekzamenon, se mi ĝustatempe estus resaniĝ — a. 11. Mi vidis, ke la arboj, falig — aj de la arbhakisto, estas transport — aj per veturilo. 12. Oni trovis la kadavron de la mortig — o, sed ĝis nun oni ne sukcesis aresti la mortig — on. 13. Nur malrapide ni progresis, ĉar la tero estis kovr — a de alta tavolo da amasiĝ — a neĝo. 14. Li heredis la tutan havaĵon de la mort — o. 15. Kiam mi prenis mian biciklon, la pneumatiko montriĝis krev — a.

Ekzercu vin en la konversacio kaj respondu ĉi subajn demandojn per kompletaj frazoj :

1. Kio estas vegetarano ?

2. Kiom da piedoj havas serpento ?

3. Kiajn ekspoziciojn vi ŝatas ?

4. Kiom da salajro vi ricevas en unu monato ?

Speciala eldono de « La Ponto » 1950 5-6, nomigas « Nieder mit den Sprachenskranken ! » (For la lingvaj baroj!) ; la eldonkvanto atingis, nu, imagu : 25.000 ekzemplerojn... Kaj ĝi indikas la vojon al la universala lingvo. Ĝin verkis : la supera registara konsilantaro, d-ro Art. Bormann. Stencilita resumo ebligas al ni sekvi la disvolvon de la enhavo, kiun ni jen koncize prezentas.

I. Aktualiginta problemo : la pli rapida evoluo de la tekniko kompare al tiu de la politika homa soci-ordo. Malgraŭe la unua devas venki la duan kaj la naciecaj limoj devas esti venkataj pro la internacia tekniko. Ĉar ekzistas intimaj internaciaj rilatoj ankaŭ devas esti ĝi internacia komprenilo. Post multaj aliaj Zamenhof publikigis en 1887 sian Esperanton. Interkomprenigo do ekestu pro la malhelpo de la nacia pensmaniero, kiun ne forigas tradukado, kiu ne permesas personan kontakton.

II. Eblaj solvoj estas esplorataj, post kiam la aŭtoro fiksas la kondiĉojn por tia universala lingvo. Nek « nacia » lingvo, nek ekz. la latina konvenas. Tial « artefarita » lingvo !

III. La hodiaŭ situacio : Esperanto aktuale regas, ĝi estas forta, ĝi respondas al kontraŭ-argumentoj !

IV. Estonta evoluo : signas ĝin plisimpligo sur nacia kaj internacia kampoj (konferencoj sen tradukistoj, pli facila vojaĝado, pli facila trafiko, ktp.). Esperanto estu la dua lingvo por ĉiu ! Ni adoptu kaj eklernu Esperanton, ĉar, kiel universala lingvo, ĝi kreos fratecan, universalan spiriton en la mondo. Tiel ni servos la tuthomaron. Sekvas fine la statuto de GEA, klarigoj pri la Germana E-Instituut kaj invito al kunlaborado kun GEA kaj studi Esperanton.

Tiu klara, simpla, bone argumentita disvolvo de la aktuala problemo de la universala lingvo en rilato kun la aliaj aspektoj de la homa vivo estas nepre interesa kaj ĉiu konanto de la gemana lingvo nepre dezirus legi ĝin por ĉerpi el ĝi elementojn por uzi la saman konvinkan propagandon sur la propra teritorio !

BRITA POLITIKA PARTIO SUBTENAS ESPERANTON

Ĉe la 8-a jarkunveno de la partio Common Wealh la delegitoj aprobis dokumenton, laŭ kiu inter la agaro de la Common Wealth troviĝas :

la propagando por la enkonduko de E. en ĉiujn lernejojn en la mondo kie oni ne jam instruas ĝin.

Tiu nova sukceso por nia lingvo sekvas la eldonon en E. de Manifesto por Tutmonda Kunvoko de ĉiuj, kiuj kredas je Libero, Egalo, Frateco por ĉiuj homoj, kiun subtenas C.W. kaj aliaj organizoj.

C.W. akceptis la rezolucion rezulte de la laboro de geesperantistoj en la partio. Alilandaj samideanoj helpos fortigi de salutoj al : Common Wealth, 12 High st. Hamstead, London, N.W. 3, Anglujo.

ketje verbaasd, « ik zit hier helemaal alleen. »

« Tja », zei de gelukkige vader, terwijl hij zich achter het oor krabde, « dan zal ik toch maar eerst even gaan kijken of er werkelijk twee zijn. »

El : « Ponto al la Praktiko »

Uit de vertalingen van het stukje proza uit « Fabelo » in het vorige nummer is gebleken, dat de meeste inzenders de tekst wel begrepen hebben, maar de vertalingen waren vaak nog te stijf.

Het woordelijk vertalen is hier natuurlijk uit den boze. Wil men aan de eis « vertalen in vlot, gangbaar Nederlands » voldoen, dan moet men natuurlijk min of meer vrij vertalen en zich losmaken van de zinsbouw in Esperanto. Het is pas in orde, wanneer de te vertalen tekst zó is weergegeven, dat de vertaling niet meer als zodanig weergegeven, dat de vertaling niet meer als zodanig wordt gevoeld.

Hier volgt tot slot nogmaals een dergelijke opgave ter vertaling :

Al la rigardoj de l' rajdantoj etendiĝas ebena, sunkisata en sia tuta fruktiĉa beleco. Fresiĝe blovetas facila venteto. Okuligante nur fruktaturaj kampoj, kaj kelkloke, tie kaj tie ĉi neĝe blankas aŭ arde flavas muroj de l' vilaĝoj kaj bienetoj. Fagoj dissovas kvazaŭ benogeste siajn ombrodonajn brandojn. La aleo, laŭ kiu galopas rajdanto similas per siaj morusujoj al ombra, verde tegmentita koridoro. Ĉerande fluas rivereto murmurante sian eternan monologon. En la aero gojtriloj de birdoj. Susurete zumas diligentaj abeloj svarme pendantaj sur floroj. La tuta pejzaĝo elspiras trankvilon, silenton kaj harmonion.

El : « Cezaro ».

Uitwerkingen van Vlaamse cursisten voor 20 November aan V.E.B., Studanto, postbus 342, Brussel; van Nederlandse cursisten aan A. J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam-Z.

Tracht de volgende uitdrukkingen in gangbaar Nederlands te vertalen :

Nekunigeblaj vortoj ; insida demando ; aĉeti partopage ; havi altan opinion pri si mem ; komuniza esprimo ; pri tio zorgos estonto ; elektita societo ; esti en mona embaraso ; la nuboj kunbuliĝas ; la celo pravigas la rimedojn ; mi ne akceptas ordonojn ; senfenestra muro ; tempo venos, zorgon prenos ; tro fervore komenci ; okazo kreas ŝteliston ; kaŭstika kalko ; koincido de cirkonstancoj ; senelira relbranĉo ; malŝarĝi sian koron ; distrumpeti ion ; el malgrandaj akveroj farigas riveroj ; riproĉprediki al iu ; pagi per preciza mono, nekonusvena ŝerco ; ĝis nova ordono ; optika trompo.

Ter vertaling :

Beperkte verdraagzaamheid.

« Ik vind het niet zo erg », zei de professor, « wanneer ik zie, dat een van mijn studenten tegen het einde van het college-uur ongedurig wordt. Ik vind het zelfs niet erg, wanneer er een is, die zijn horloge te voorschijn haalt en kijkt, hoe laat het is. Maar wanneer iemand zijn horloge te voorschijn haalt, er op kijkt, het tegen zijn oor houdt en het dan schudt — daar kan ik mij inwendig kwaad om maken. »

Begrijpelijke twijfel.

Voordat de man zijn tweeling was gaan aangeven bij de Burgerlijke Stand, had hij met een paar vrienden gefeest op de grote gebeurtenis. Eindelijk bedacht hij, dat het nu toch hoog tijd werd, de formaliteit te gaan vervullen. Hij laveerde de zetel van het gemeentebestuur binnen en wendde zich tot de eerste de beste klerk achter het loketje.

« Heren... » begon hij.

« Heren ? sprak de man achter het lo-

NED. ESPERANTISTEN-VEREN. « LA ESTONTO ESTAS NIA »

Alg. Secretariaat, schr. cursus voor beginners en uitleendienst : Mr. A. J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam-Zuid, Tel. 96160. Penningm. : P. M. Mabesoone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam-O. Postr. 34563. Boekenclerst : H. A. Appel, Z.O.singel 5, Bergen op Zoom, postrek. 76915. Bibliotheek : E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht. Propaganda-dienst : H. Bakker, Van Tuylplein 33/1, Amsterdam-Zuid, tel. 95320. Schr. cursus v. gevorderden, examen B: H.A.Appel, Z.O.-singel 5, Bergen op Zoom. Alg.Ned.Esp.Examen-comm.: Mej.H.M.Mulder, Zilvermewuistr. 29, Badhoevedorp Cefdel. U.E.A. : P. Moen, Schaarbergenstraat 104, Den Haag, postrek. 79167.

KOMUNIKOJ DE LA ĈEFESTRARO

Laŭ par. 33 de nia regularo proponoj por la ĝenerala jarkunveno atingu la ĝen. sekretarion antaŭ la 15-a de novembro, sed ĉar la jarkunveno en 1951 okazos ne kiel kutime je Pasko sed je Pentekosto, ŝajnas al ni dezirinde, ŝanĝi la daton kaj fiksi kiel limdaton por la ensendo de proponoj la 15-an de decembro.

Por ke la sekcioj povu fiksi la budĝeton por la venonta jaro ni jam nun sciigas, ke la adm. ĉefestraro proponas malgraŭ la plialtigo de preskostoj kaj aliaj elspezoj ne ŝanĝi la kotizojn por la venonta jaro kaj provizore prokrasti plialtigon, kiu en 1952 verŝajne fariĝos neevitebla. Laŭ tiu propono la kotizoj do restos por ĝeneralaj anoj g. 4,—; por sekciaj anoj g. 3,50; por samhejmanoj, kiuj ne ricevas « Nederlanda Esperantisto » g. 1,50; por senlaboruloj g. 2,— kaj por gejunuloj malpli ol 21-jaraj g. 1,50.

Komence de la nova jaro la sekretarioj sendu al ni siajn raportojn pri la jaro 1950. Por faciligi al ili tiun taskon, ni kiel kutime dissendos al ili demandaron, kiun ili resendu antaŭ la 10-a de januaro 1951 kune kun 3 ekzempleroj de la membrolisto laŭ la stato je la 1-a de januaro 1951. La sekretarioj nepre sciigu al ni antaŭ la 10-a de novembro 1950 la nomojn de event. eksigitaj anoj. La antaŭan jaron pluraj sekciaj sekretarioj forgesis tion kaj tiel endanĝerigis la budĝeton.

Volonte ni ekscios, ĉu la sekcioj kaj individuaj membroj interesiĝas pri eldono de propra L.E.E.N.-kantarono, kiu enhavos stencilitajn tekstojn de pluraj kantoj. Por ke ni povu decidi pri event. eldono, kiu laŭ financa vidpunkto estos sufiĉe riska, la interesguloj bonvolu antaŭmendi kaj sciigi la dezirantan kvanton al la ĝen. sekretario antaŭ la 10-a de decembro. Ju pli granda estos la eldonkvanto, des pli malalta estos la prezo!

La provizo de « Esperanta Krestomato » estas elĉerpiganta. En 1951 aperos dua eldono, kies enhavo estos tute egala al tiu de la unua. Verŝajne la prezo plialtiĝos, sed ni nun ankoraŭ povas liveri ĝin por la malnova prezo g. 1,50. Do, kursgvidantoj, profitu la okazon kaj rapide mendu!

Ĉu vi serĉas taŭgan donacon por la venontaj festotagoj? Ni ankoraŭ disponas pri malgranda kvanto da « Rembrandt, la Magiisto », de M. Muller. La libro estas fortike bindita kaj presita sur luksa antaŭmilita papero kaj enhavas 100 belajn fotokopiojn de pentraĵoj kaj akvafortoj de la fama nederlanda pentristo. Prezo nur g. 5,—

Ĉiu kliento, kiu en novembro aĉetos por almenaŭ g. 1,50 ĉe nia libroservo, ricevos senpage ĝis elĉerpiĝo belan ilustritan prospekton pri Bavario kaj du faldfoliojn, resp. de K.L.M. kaj Deutsche Bundesbahn.

LEGU KAJ STUDU!

Ŝajne multaj anoj ankoraŭ ne scias, ke senpage ili rajtas prunti librojn el nia biblioteko, por tiamaniere laŭ agrabila maniero pligrandigi sian lingvoscion. Legu en la vintraj monatoj; elektu libro(j)n laŭ via plaĉo el la katalogo, kiu mencias multajn studverkojn kaj literaturarojn por komencantoj kaj progresintoj kaj petu alsendon al la bibliotekisto s-ro E. A. Koot, J. de Meesterstraat 12, Utrecht. Tiuj, kiuj perdis la katalogon, povas ricevi novan ekzempleron, pagante g. 0,15 per poŝtkonto 34563 de L.E.E.N. aŭ per poŝtmarkoj al la ĝen. sekretario.

AL HILVERSUM!

Tiuj, kiuj kutimas viziti la ĉiujarajn L.E.E.N.-kongresojn, devos je Pasko 1951 rezigni pri tiu kutimo. Feliĉe ili devos prokrasti la vojaĝon al la kongresurbo ne ĝis Sankta Neniamo, sed nur ĝis Pentekosto, ĉar ne je Pasko, sed la 12-an, 13-an kaj 14-an de majo L.E.E.N. aranĝos sian XVIII-an kongreson en Hilversum, verŝajne en kunlaboro kun Flandra Ligo Esperantista, kiu samdate kaj samloke okazigos sian XVI-an kongreson.

Jam naskiĝis la L.K.K. kaj diversaj laborkomisionoj kaj la hilversumanoj preparas sin, por deĉe akcepti vin ĉiujn kaj oferi al vi kelkajn neforgeseblajn tagojn!

Jen la unuaj komunikoj: Kongresejo: Hotelo « Santbergen », Noorderstraat 2, Hilversum tuj apud la stacidomo.

Sekretariino de la L.K.K.: f-ino S. Visser, Galileistraat 42, Hilversum.

Kongresa poŝtkonto 378964 (de f-ino S. Visser).

Kongreskotizo antaŭ la 1-a de marto g. 3,—; poste ĝis la 15-a de aprilo g. 3,25 kaj post tim dato g. 3,75; por unutaga partopreno antaŭ la 15-a de aprilo g. 1,75 kaj poste g. 2,—.

Malvarma lunĉo je la 13-a de majo g. 2,—; festa tagmanĝo g. 2,75 (la prezoj por la lunĉo kaj festmanĝo inkluzivas la trinkmonon).

Sekciaj estraroj, instigu viajn anojn al partopreno kaj ĝustatempe aranĝu ŝparkasojn por ebligi partoprenon al kiel eble plej multe da personoj!

Aliĝilo estos aldonata al la januara numero.

UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO 1951

La fervora L.K.K. jam nun dissendos la unuan oficialan bultenon, enhavantan diversajn sciindaĵojn pri la Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos 4-11 aŭg. 1951 en München kaj la aliĝilojn. Kongreskotizo ĝis la 31-a de dec. gm. 18,— (f. 16; b.fr. 210); por edz(in)oj de kongresanoj gm. 9,— (f. 8 b.fr. 105) kaj por gejunuloj malpli ol 20-jaraj gm. 6,— (f. 5,5; b.fr. 70,—). Ĉiuj prezoj laŭ la kurzo en junio 1950. Adreso de la L.K.K.: Engelbertstr. 7, München-Pasing, (13 b), Germanujo. Al ĉiuj sekcioj ni sendis kelkajn ekzemplerojn, sed krome la ĝen. sekr. de L.E.E.N. volonte senpage sendos la bultenon kaj aliĝilo(j)n al ĉiu, kiu deziras ricevi ilin.

VERDLANDO VOKAS (VII — 29 - IX - 1950).

Informoj kaj petoj: Sangoj en la listo. — En la listo publikigita en la lasta n-ro vi bonvolu fari jenajn sangojn: Bonvolu forstrecki provizore la elsendojn de Lille (merkrede), Graz (ĵaŭde) kaj Vieno (vendrede). Bonvolu atenti pri jenaj novaj ondongoj:

Romo uzos dimanĉe kaj vendrede nur la ondojn 19,5 m. kaj 31,1 m. K.R.O. kaj N.C.E.V. elsendos en la lasta kvarono de la jaro per Hilversumo I, 402 m.

V.A.R.A. elsendos en la lasta kvarono de la jaro per Hilversumo II, 298 m.

Vendredon 15-an de dec. s-ro C. P. Brakké parolos antaŭ la mikrofono de N.C.E.V. (18.15-18.30 M.E.T.) pri la tago de l' libro. Kunlaboros s-ino J. Koopmans-Schotanus (kantistino) kaj s-ro M. Boekel (orgenisto).

Antaŭ la turka radio dissendos Esperanto-programeron.

La estraro de la radiofonio en Ankara diskutas pri dissendoj en Esperanto. La tieaj iniciatintoj de tiu ideo petas vin skribi al la stacio por ĝin influu favore al tiu dissendo. Adreso: Basin-Yagin, ĝenel Müdürlüğü, Ankara (Turkio).

Radio-Servo N.C.K.E., Waltweg 3, Tjerkwerd (Fr.), Nederlando.

Flandra Ligo Esperantista

GENERALA JARKUNVENO.

Ĉiuj membroj estas invitataj al la ĝenerala jarkunveno de Flandra Ligo Esperantista, Bruselo, la 19-an de novembro en ejo Hotel Monico Noordstation Brabantstr. (angulo St. Lazarustr.).

Bruselo je la 2-a precize.

TAGORDO:

1. Malfermo
2. Financa situacio
3. Raporto de la sekretario
4. Komunikoj de F.E.I.
5. Nia revuo
6. U.E.A.
7. Nia 16-a kongreso en Hilversum
8. Amiko-varbado
9. Elektadoj
10. Diversaĵoj
11. Fermo.

Ni insiste petas ĉiujn sekciojn delegi kompetentan membron, ĉar la administrado de la ligo iĝas ĉiam pli komplika, kaj nur partoprenante ĝeneralan kunvenon, la gemembroj ekscios diversajn aspektojn de nia evoluo kaj komprenos pli klare la decidojn de la estraro.

ESTRARKUNVENO DE FL.L.E.

En la sama ejo sed antaŭ-tugmeze, je la 10-a okazos la kunsido de la estraro. La tagordon ni aparte komunikos al ĉiuj estraranoj.

KONGRESO EN HILVERSUM.

Ni antaŭvidas ke multaj ligoj nur malfacile povos ĉeesti la universalan kongreson en 1951. (München) Despli ni esperas ke ili multnombre partoprenos al nia 16-a en Hilversum. La tradiciaj programpunktoj okazos kiel kutime — jarkunveno, fotografado, balo, vespero prizorgota de sekcio Brugge, ekskursoj, vizito de la vidindaĵoj k.t.p. — sed nur la speciaj ligaj kunvenoj estos aparte organizataj.

Aliflanke, ni certas ke entute pli ol 250 gekongresanoj, de ambaŭj ligoj, ĉeestos la komunajn aranĝojn.

Por pliaj detaloj vi interrilatu dum la ĝenerala jarkunveno kun la karavanestro: Vicprezidanto Cortvriendt, Diepestraat, 44, Antwerpen.

ATENTU!

1. Bonvolu pagi tuj vian kotizon al la kasisto.
2. Vurbo amikojn (20 Fr.) kaj donu al ili ekz. de « De Esperantist ». Ĉiu sekcia sekretario kaj reprezentanto ricevis kvanton. Izolitaj membroj petu kelkajn ekzemplerojn ĉe la sekretario. (Prins Leopoldstraat, 51, St. Kruis (Brugge).

Via sekretario
M.G.



Konstanz, Bodensee, germanlingva faldprospekto pri la konata urbo apud la Konstanca Lago, kun detala aldona klarigo en Esperanto. Tre havinda i.a. pro la belaj fotoj; senpage ĉe Städt. Verkehrsamt, Konstanz, Germanujo.

« Wir lernen Esperanto »; 80-paĝa lernolibro de W. kaj H. Wings 3-a eldono. Prezo gm 2,—. Recenzo sekvas.

Ferioj en Germanujo!; faldfolio eld. de Deutsche Bundesbahn.

Prospekto 4-paĝa eld. de K.L.M. (Reĝa Nederlanda Aertrafika Kompanio) okaze de la 36-a Universala Kongreso en München.

Bavario. Plaĉaspekta plurpaĝa faldfolio kun teksto de d-ro S. Ziegler kaj diversaj belaj fotoj; eld. de la ŝtata komisio por la bavara fremdultrafiko en München.

Vortoj kaj Esprimoj por komencantoj de s-ro C. B. Zondervan; eld. de J. Muusses, Purmerend. Prezo g. 1,15.

La celo de ĉi tiu 70-paĝa libreto estas havigi al komencantoj certan provizon da vortoj kaj esprimoj, por ke ili jam en la komenco de la studado klopodu konversacii esperantlingve. Sendube multaj kursgvidantoj volonte uzos ĉi tiun novan libron flanke de la elementa lernolibro en siaj kursoj. Estas ja konata fakto, ke multaj lernolibroj, kiom bonaj ili cetere estas, tro multe atentigas la teorion kaj neniel aŭ tro malmulte instigas la studentojn al praktika uzado de la lingvo. Sed ne nur en kursoj oni sukcese povos uzi la lernolibron; ankaŭ tiuj, kiuj per sininstruo kapabligas sin pri Esperanto, trovos en ĝi multajn esprimojn el la ĉiutaga vivo, kiuj faciligos al ili konversacii Esperante kaj helpos ilin en la studo por la A-diplomo. Ni trovis kelkajn vortojn kaj esprimojn, laŭ ni tro laŭlitere tradukitajn el la nederlanda lingvo. Ĉu ekz. irtapiŝo estas taŭga traduko de gangloper? Ĉu sur aliaj tapiŝoj oni ne iras? Kial piĝamo anstataŭ piĝamo (P.V.)? Laŭ nia gusto la vortlistoj, kiuj ja troviĝas ankaŭ en multaj lernolibroj estas tro longaj kaj forprenas multan spacon, kiun oni povus utiligi pli bone, plivastigante la partojn kun esprimoj kaj konversaciaj frazoj. Tamen malgraŭ tiuj malgrandaj difektoj ni volonte rekomendas la « novulon » al ĉiuj kursgvidantoj. La libreto estas havebla ĉe nia libroservo, Z.O.-Singel 5, Bergen op Zoom.

Esperanto-Lehrbuch für Fortgeschrittene (insbesondere für Volkshochschulen sowie für Lehrer und Studierende) von G. Streidt, eld. S. Ziegler Verlag, München-Pasing, 1950, p. 77.

Ĉi tiu plaĉe prezentata verko estas lingve aprobita de la Lingva sekcio de GEA, tiel ke ĝi certe havos valoron. La libro estas destinita por germanoj kaj la materialo estas orde kaj sisteme klarigata. Ĉiuj lecionoj enhavas: A. legokaj tradukmaterialon, B. konversaciajn elementojn, C. gramatikan studon pli fundan. Ekde la 13 leciono (la libro enhavas 20 lecionojn), la materialo fariĝas pli diversa: Poeziaĵoj, konsilioj kaj studoj pri bona stilo, datoj el la historio de E., Volapük, ktp. indikoj koncerne korespondadojn k.c. Aspekto kaj enhavo de la libro ŝajnas

bonega kaj tial konsilinda al praktikantoj de la germana lingvo.

Tutmonda adresaro de Esperantistoj, fare de H. Steiner, sub la aŭspicio de la Internacia Esperanto-Muzeo, Wien, 1950, p. 154, prezo: 12 rpk.

Tiu adresaro, kiu celas neniel konkurenci la Jarlibron de U.E.A. estas fakte senluziĝo, kvankam la aspekto estas bona! Nu, enestas preseraroj (pro kiuj la kompilinto, s-ro H. Steiner, 72-jara, kiu mem faris la tutan laboron, estas senkulpebla!) sed krome multaj misaj indikoj koncerne la adreson de la enlistigitaj kaj pri ilia korespond-emo kaj -eblo. Ni legis en « Esperanto » ke tio validas por Anglujo; por ni la sama ri-proĉo estas farata! Oni, povas prezenti al si la impreson, kiun havas la Esperantisto, kiu korespondemas kaj vane skribos! Oni povas prave meti la demandon ĉu la aperigo de tia adresaro, malgraŭ la bonvolo kaj klopodo de la kompilinto, estas inda (ĉu ne malutila?) por nia movado ĝenerale.

Leerboek van Esperanto (ook voor zelfstudie) door F. Randi, eld. Firma Witteryck, Brugge, 1950, p. 96 Recenzota.

Esperanto — Norsk Ordbok de Ragnv Rian, eldonis Esperanto-Forlaget a/s, Oslo, 1950, p. 174.

Jam tuj, la klara preso, la hela papero, la fortika bindo kaj la ĝenerala aspekto tiras la atenton kaj plaĉas. Elemento ne neglektebla, kiam temas pri vortaro, nu, timiga libro!

El la Forord, ni komprenas ke la vortaro enhavas la radikojn de Plena Vortaro kaj krome grandan parton da aliaj, ĉerpitaj en la Esperanto-literaturo, kio certe ne estas malavantaĝo. La uzitaj signoj kaj indikoj ŝajnas logikaj kaj praktikaj.

Tial ne ekzistas dubo ke la verko certe logos la norvegajn samideanojn kaj utilos al ili; ni aldonu ke la Esperanto-Forlaget de Oslo, eldonante ĉi tiun verkon nepre forigis gravan mankon kaj nepre kontribuis al la plivastigo de Esperanto en Norvegujo.

Redakciaj sciigoj

La ensendantoj de komunikoj kaj de artikoloj estas petataj havigi ĉion al la redakcioj — laŭ la lundo, kiel sube indikate —, nepre antaŭ la 15-a de la monato, se ili deziras aperigon en la numero de la posta monato!

Ili krome maŝinskribu, se eble, la manuskriptojn, lasante spacon inter la linioj, kaj uzante nur unu flankon de la papero!

Evitu tempoperdon kaj tedan deĉifradon al viaj kompatindaj redaktoroj!

La redaktoroj estas, por Nederlando, sro Mag. A. J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam Z. kaj por Flandrujo, sro Dro T. Van Gindertaelen, Louisastr. 23 Mechelen (Antwerpen).

Niaj Esperanto-Enigmoj kun premioj

PREMION akiris por VEB, post n-roj 91-92 : F-ino M. Buts, el Mechelen ; (81 p.) kaj por LEEN : S-ro F. Prak el Arnhem.


SOLVOJ.

N-ro 93. *Horiz.* 1. kiosk ; 2. kruciĝ. 3. ludon. 4. lakona. 5. ŝancel. 6. konfitaĵ. 7. fiŝosto. 8. drakon. 9. adiaŭo. 10. grimpo. 11. egoist. 12. lerta. *Vert.* 1. kaleŝ. 2. indign. 3. orden. 4. okazig. 5. konveks. 6. lot ; ostr. 7. skal ; nod. 8. regal. 9. funkci. 10. kribr. 11. fianĉa. 12. nepra.

N-ro 94. Promeso, planedo, difino, hamstro, sitelo, dilemo, esprimo, tapiŝo, krusto, algebro, saturi, plekti, vokalo, katedro, aktoro, profilo, teraso, formulo, saliko, streĉi, ampolo, amatoro, galero, brasiko, akvario, arbitra, aresti, kolono, angoro, barilo, araneo, sekalo, aperti, masaĝo, dolaro. Pli helpas guto da felĉo, ol barelo da saĝo. (812).

N-ro 95 : KRUCVORTENIGMO.

Horizontale. 1. ĝi restas post la falĉado (R) ; angla alkoholaĵo (R). 2. homa internaĵo (R). 3. oni pafas per ĝi. 5. trinkaĵo (R). 6. senkompense doni (R). 7. oni pafas per ĝi (R) ; metafora (R). 8. parto de teatraĵo (R). 9. fermi pardonon per ŝovebla metala peco (R) ; parto de vagono (R). 11. oni pafas per ĝi.



Vertikale. 1. oni pafas per ĝi (R). atinĝi ion celitan (R). 3. oni pafas ĝin (R). 4. montri subitan gajecon pri io per karakteriza voĉbruo ; purigi (R). 5. senergia. 6. ĝi stimulas ĉevalon (R) ; oni pafas ĝin (R). 7. poseda adjektivo ; el ĝi oni ekstraktas petrolon (R). 8. troa plimultiĝo de la papermona kvanto en la cirkulado (R) ; signo uzata kiam oni skribas muzikverdon (R). 9. smlraĵo kiu forte kunigas du objektojn (R). 10. ĝi estas uzata por plibonigi la teron (R). 11. eksploda aparato uzata en marbatalo (R).

N-ro 96 : KRUCVORTENIGMO.

(Sama krado kiel n-ro 95). *Horizontale.* 1. penikforma ornamo por vestoj (R) ; prononci apartigante la silabojn (R). 2. duo (R). 3. doktrino por kiu pledis Zamenhof, kaj kiu postulas, ke ĉiu rigardu kaj amu ĉiulandajn homojn kiel siajn fratojn. 5. manĝebla ruĝa bulforma radikulo (R). 6. grasa manĝebla substanco (R). 7. tre malagrabla korpa impresio (R) ; signo por aŭtentikigi dokumenton (R). 8. sufikso (R). 9. provizi per ĉiuj necesaj iloj (R) ; malmola minerala maso (R). 11. germano, kiu per sia mona subteno ebligis al Zamenhof daŭrigi en 1892-1894 la eldonadon de la sola Esperanto-gazeto « La Esperantisto ».

Vertikale. 1. sviso, kunfondinto de U. E. A. Li postlasis al UEA gravan parton de sia havaĵo kun la celo certigi ĝian ekziston. 2. bonodora floro (R). 3. lupreni. 4. insekto ; prepozicio. 5. furioza virino (R). 6. ĝi estas en la buŝo (R) ; facile klasigebla folieto kun notoj (R). 7. bonfarto (R) ; kovejo (R). 8. distingilo pri vero kaj malvero (R). 9. akvero (R). 10. aŭreolo (R). 11. malfermi sian buŝon (R).

La solvojn sendu la nederlandanoj al S-ro Teunissen, Burg, Tellegenstr. 21 hs., Amsterdam-Z. ; kaj Flandra Ligo al Postbus 342 (Enigmoj), Brussel, antaŭ la 20.11.1950.

Plaatselijk Nieuws

V.E.B. — *Sekcio Brussel* : Jam de post la fino de la ferioj la sekcianoj el Bruselo denove kunvenas. Nova estraro estis elektata : Ges-anoj De Bruyn kiel prezidanto ; Monnaers M. kiel sekretario ; De Potter L. kiel kasistino. Por Novembro ni havas jenan programon : 3-11 ; legado de Sep Vangofrapoj kaj poste ludoj ; 9-11 : Tradukaĵoj ; 16-11 : Sep Vangofrapoj kaj la Studanto el Fl. Esp. ; 23-11 : Parolata Gazeto.

V.E.B. *Afdeling Brugge* : Einde October hebben wij, met de medewerking van de Brugse afdeling van de Vlaamse Toeristen-Bond een Esperanto-cursus georganiseerd.

Voor de werkvergaderingen in November voorzien wij een spreekbeurt en een filmvoorstelling buiten het kader der gewone rubrieken.

V.E.B. — *Afd. Gent* : Alhoewel de vergaderingen regelmatig doorgingen gedurende de verlofperiode, zijn wij nu met nieuwe moed begonnen met de propaganda ten voordele van Esperanto. Eerst en vooral willen wij gaarne onze leden geluk te wensen welke door hun succes buiten Esperanto om, nieuwe mogelijkheden van propaganda schein, zo behaalde Mr. Mertens de titel van dokter in de rechten, Mr. De Schepper kwam weder een stapje dicht bij de ingenieurstitel, Mr. Vanneste behaalde te Brussel de gouden medaille van Laureaat van de arbeid, afdeling banketbakker en roomijs.

Mr. Mortelmans kreeg, door een welvoorbereide propaganda, de toestemming een Esperanto-cursus te geven aan het Koninklijk Atheneum te Deinze. Deze cursus vangt aan rond 15 Oktober. Voorwaar een beloftevol succes. Mr. De Boes zal een esperanto-cursus geven in de lokalen van V.T.B. Gent, ingang Paddenhoek, van 15 November af om 19.15 u.

V.E.B. — *Afdeling Leuven*. — Op 23, 24, 25, 30 Sept. en 1 Oktober werd met

medewerking van het Instituut alhier een Esperanto-tentoonstelling gehouden. De zaal werd gratis door het stadsbestuur ter onzer beschikking gesteld. De Esp. postzegelverzameling van de president I. Boving en het toerismehoekje trokken vooral de aandacht der bezoekers. Op Zaterdag 14 Oktober algemene vergadering — bespreking van het organiseren van wintercursussen.

V.E.B. — *Afdeling Mechelen* : Het aangekondigd programma werd, zoals voorzien, afgewikkeld. Daarenboven hield op 19 Oktober Mej. S. Nelissen een lezing over « Biografie de Viro » ; zij (de lezing) wekte heel wat belangstelling, zo zelfs dat de « Viroj » besloten een « Biografie de virino » uit te werken...

De avond-cursus, ingericht in het kader der Stedelijke Avond-leergangen, genoot een flinke belangstelling ; 10 leerlingen werden opgetekend ; een paar hunner werden reeds lid van onze Bond !

Programma November : 8.11, Forto de l' Vero ; 15.11, Enigmoj ; 22.11, Gramatiko ; 29.11, Parolado de sro Bertels.

ANONCETOJ

Ĉiu vorto aŭ mallongigo : g. 0,05 aŭ bfr. 0,75. Minimume : g. 1.— aŭ bfr. 15.—

Deziras korespondi konstante kun kelkajn gesamideanoj : Andersz Mieczyslaw WROCLAW « 16 »-ul. Gornloza 55-Poluje.

Deziras kontakton kun grupoj de sindikatoj, celante korespondadon pri mond-paco, Friedenskomitee der Stadtsparkasse Dresden, Güntzplatz, 5, Dresden-A 16, (10 a) Germanujo.

F-ino Maria de Jesus Tavarez, Estrada do Ferte 61, Cordeiro Recife Par-nambuco, Brazilo, deziras korespondi kun nederlandan(in)o.

Viro kaj virino loĝis en beleta malgranda domo kaj nenio mankis al ili por esti perfekte felĉaj. Malantaŭ la domo troviĝis ĝardeno kun belaj, maljunaj arboj ; en ĝi la virino kulturis la plej maloftajn plantojn kaj florojn.

Iutage la viro promenis en la ĝardeno, ĝojis pri la ravaj odoroj de la floroj kaj rezonis : *Kiom felĉa homo mi estas kaj kiom bonun, amindan kaj lertan edzinon mi havas ! Rezonante tiel, li rimarkis ion moviĝi apud liaj piedoj. La viro, kiu estis tre miopa, klinis sin kaj ekvidis birdeton, kiu estis falinta el la nesto, ankoraŭ ne povante flugi. Li levis ĝin, rigardis ĝin kaj portis ĝin al sia edzino.*

« Karulino », li diris, « mi kaptis birdeton ; mi kredas, ke ĝi estus najtingalo. »

« Strange », respondis la edzino, « ĉe ne rigardante la birdidon. Kiel juna najtingalo povus veni en nian ĝardenon ? Plenaĝaj najtingaloj ja ne nestas en ĝi ! »

« Vi povas esti certa, ke ĝi estas najtingalo. Mi cetere jam iam aŭdis unu kantanta en la ĝardeno. Estos rave, kiam ĝi estos granda ! Mi tiom ŝatas la kantadon en najtingalo », diris la viro.

Tiam la virino levis la okulojn supren de sia trikaĵo — ŝi ĵus perdis maŝon — kaj diris, laŭte ridante, « Sed karulo, ĝi ja estas juna pasero ! »

« Karulino », iom kolere respondis la viro, « kiel vi povas opini, ke mi intermiksas najtingalon kaj paseron ? Vi komprenas nenion pri naturhistorio ; estante knabo mi havis kolekton da papilioj kaj skaraboj ! »

« Sed, kara mia, mi demandas vin : ĉu najtingalo vere havas tiom larĝan bekon kaj tiom dikajn kapon ? »

« Jes, ĝi certe havas », diris la viro, sed la virino facile trovis respondon. Longan tempon tio daŭris, ĝis kiam ili treege kverelis. La viro fine furioze eliris la ĉambrom por preni malgrandan kaĝon. Post tio la virino diris, ke ŝi ne volas havi la abomenindan beston en la loĝo-ĉambro kaj la viro emfazis, ke li ankoraŭ estas mastro de la domo. Li metis la birdon en la kaĝon, zorgis pri formik-ovoj kaj eknutris la birdon, kontraŭ tio la pasero aŭ najtingalo tute ne protestis.

Dum la vespermanĝo la viro kaj la virino sidis ĉu ĉe angulo de la tablo, kaj ne parolis ĉe unu vorton unu al la

alia.

La postan matenon la virino jam tre frue venis al la lito de sia edzo kaj serioze diris : « Kara edzo, hieraŭ vi estis tre malĵusta kaj malafabla al mi. Mi ĵus ankoraŭfoje atente rigardis la malgrandan birdon, sed certe, ĝi estas juna pasero. Ĉu vi konsentas, ke mi liberigu ĝin ? »

« Ne tuŝu mian najtingalon ! » furioze kriis la viro kaj post tio ne plaĉis al li rigardi sian edzinon.

Tiel pasis dek kvar tagoj. Sajnis, ke felĉo kaj paco malaperis por ĉiam el la malgranda domo. La viro grumbliis kaj kiam la virino ne grumbliis, ŝi ploris. Sed la birdeto pli kaj pli grandiĝis pro la formik-ovoj. Ĝiaj flugiloj kreskis videble, tiel ke ĝi povos baldaŭ flugi. Ĝi saltis en sia kaĝo pepante, pepante... kiel vera juna pasero. Kaj ĉiŝfoje tiu pepado tranĉis la koron de la virino kvazaŭ per tranĉilo.

Iun tagon la viro eliris kaj la virino sidis ploranta en la ĉambro. Ŝi pripensis kiom felĉa ŝi estis kun sia edzo, kiom plezure ili pasigis la tagojn kaj kiom multe li amis ŝin. Kaj ĉio ĉi estis for de post la tempo, kiam tiu malbenita birdo estis venanta en la domon. Subite ŝi eksaltis kiel ŝi, kiu ekdecidis fari ion. Ŝi prenis la birdon el la kaĝo kaj lasis ĝin salteti en la ĝardenon.

Tuj post tio la viro venis hejmen.

« Kara edzo », parolis la virino, ne kuraĝante rigardi lin, « okazis akcidento : la kato formanĝis la malgrandan birdon. »

« La kato manĝis ĝin », ripetis la viro, rigidigante pro konsterniĝo, « la kato manĝis ĝin ! Vi mensogas ! Vi intence liberigis la najtingalon ! Tion mi neniam konjektis pri vi. Nun nia amikeco finiĝis por ĉiam. » Li tre paliĝis kaj larmoj venis en liaj okuloj.

Vidante tion, la virino komprenis, ke ŝi faris eraregon kaj laŭte ĝemante ŝi kuris en la ĝardenon por vidi, ĉu ŝi eble ankoraŭ povos kapti la birdon. Kaj efektive, meze sur la vojeto ĝi saltetis kaj flugetis, ĉar ĝi ankoraŭ ne bone povis flugi. La virino klopodis kapti ĝin, sed tio tute ne estis facila. Certe minimume

LA BIRDETO

duonan horon ŝi ĉasis post la birdo, krom tio ŝi platpremis la florbedojn. Sed finfine ŝi kaptis ĝin kaj kun malordiginta hararo kaj ruĝega vizaĝo ŝi revenis en la ĉambrom. Sed ŝiaj okuloj brilegis pro gajejo kaj ŝia koro forte batis. « Kara edzo », ŝi ekkriis, « mi sukcesis kapti la najtingalon. Ne plu koleru kontraŭ mi. Tio, kion mi faris, estis tre malbela. »

Por la unua fojo en longa tempo la viro denove afable rigardis sian edzinon kaj li opiniis, ke ŝi ankoraŭ neniam estis tiom bela kiom en ĉi tiu momento. Li prenis la malgrandan birdon el ŝia mano, tenis ĝin proksime al sia nazo, ĉiuflanke rigardis ĝin kaj diris : « Karulino mia, mi kredas, ke vi tamen pravas ; ĝi efektive estas nur pasero. » « Mia kara edzo », respondis la virino, « tion vi diris nur por furi plezuron al mi. Sed mi opinias, ke la birdo aspektas hodiaŭ ĝuste kia najtingalo. »

Ili kverelis ankoraŭ momenton pri tio, ĉar ĉiu el ili nepre deziris kulpigi sin mem, sed la instruo, kiun ĉiu povas lerni el ĉi tiu historio estas : kiam iu kaptis paseron, pensante, ke ĝi estas najtingalo, nepre ne kontestu lian opinion, kaj antaŭ ĉio ne kverelu kun li pri ĝi, ĉar post paso de kelka tempo oni tamen rimarkos, ke ĝi estas pasero kaj ne io alia.

El : FABELOJ de Leander Trad. J. Rooker.

LA BLUA MANO

verkis : M. Gilliams el la flandra : Hedero.

...Kaj mi naive komencis rakonti malhuman okazaĵon de kiam, iun vintran vesperon, mi kuŝis, tutsola, en mia lito.

Mi ĵus vekigis kaj volis tuj redormi, sed mi ne sukcesis retrovi la varman faldon kaj la saman agrablan kaveton antaŭan, kie mia korpo tiel ĝustis kaj kiu tute ĉirkaŭpremis min. Mi turnis min kaj skuis miajn piedojn nudaj ; fine ne plu estis en la lito loko, kie mi povis agrable sonĝadi. Mi kuŝis sur la dorso, la brakojn sub la kapo, kiel matene

kiam oni vekigas sed ankoraŭ tro fruas por ellitiĝi. Glacifloroj krakis sur la frostigitaj vitroj. En la strato marŝis ĉevalo kun sonorilo, Mi lasis mian ekscititan kapon fali de maldekstre dekstren kaj mi momenton fiksrigardis la noktolumeton, kiu tremadis malantaŭ blua botelo. De temp' al tempo mi klare aŭdis en la domo meti poton sur la fornon kaj ripete la kato miaŭis en la kuirejo.

Fiksrigardante la litajon, mi vidis ĉe ĝia ekstremo moviĝi ion el kio mi ne komprenis multon. Estis kiel rulvolvita ŝtrumpo, sed tamen alia, ĉar kun siaj fikksaj moveblaj partoj ĝi ŝajne apogis sur enfalantaj krabokruroj. Singarde mi malrapide retiris miajn piedojn, unue la maldekstran, poste la dekstran. Kiam mi apenaŭ movis la dekstran, la monstro ekvivis kaj ĝi proksimiĝis. Kaj ĉar mi ja maltrankviligis ĝin, ĝi ne plu kvietis. Kun timo mi subite vidis : mi rekonis bluan, malbele torditan manon, kiu incite malrapide rampadis al mi. Ĝi jam atingis genuon kaj mi antaŭvidis ke ĝi baldaŭ atingos mian bruston : ankoraŭ duo da teruraj momentoj, — kaj en mia propra lito mi kuŝis kiel birdeto kun nodita gorgo. Mi ruze provis turni min : mi kuŝis sur la ventro, la vizaĝon kaŝitan en la kuseno. Per brakoj kaj kruroj mi faris naĝomovojn, atendante ke la pleja malbono okazos.

Malvarma tremo fulmis tra mia dorso, kvazaŭ glacia fingropinto nombrante ŝoviĝus sur la tuberoj de mia spino. Sultron ekpremis pezo, sed pli supren ĝi ne grimpis kaj aĉe nenlo ŝanĝiĝis. Per forta svingo mi turnis min por forpeli la dangeron, kiu minacis min.

Nur kiam mia patrino supreniris, mi kuraĝis aperti la okulojn. Antaŭ ol mi havis la okazon rakonti al ŝi pri la blua mano, ŝi klinis sin por levpreni ion sur la planko. Dume mi aŭdis ŝin seke diri: ke sinjoro-kuracisto forgesis sian ganton.

(Fragmento el : « Eliaso aŭ la batalo kun la najtingaloj ».)

Verantw. uitgever : Vlaamse Esperantisten-Bond Postbus 342 — Brussel en Ned. Esperantisten-Vereniging LEEN, Stadionkade 6 Amsterdam Z. (Ned.) — Drukkerij : J. Van Laer, Korte Begijnstraat 38, Turnhout.